

Kostenloser Esperanto-Kurs – 3. Lektion

1. Ĉiu havas alian guston!

La sekvan tagon, Peter renkontas hazarde Klara en la strato. Ŝi portas grandan sakon.

- Bonan matenon, Klara!
- Saluton! Mi aĉetis manĝaĵojn: Du pecojn de kuko, kilogramon da pomoj, fromaĝon, panon, skatolon da kafo, nigran teon kaj unu botelon da vino.
- Ho, vi vere malsatas (mal-sat-as)! Cetere, ĉu vi pardonis al mi, ke mi hieraŭ eliris (el-ir-is) el la kinejo dum la filmo?
- Ne, mi ne vere pardonis al vi ...
- Sed mi ne konas vin bone, kaj vi jam invitis vian tutan familion al nia rendevuo.
- Jes, tion mi faris, ĉar ... ĉar en la parko vi estis tiel ...
- Kiel?
- Tiel rekta! Tio ne estas tre ĝentila. Almenaŭ oni ne tiel invitas knabinon al kinejo.
- Pardonu tion al mi, mi petas vin.
- Peter, vi skribis en via letero, ke mia robo plaĉis al vi.
- Jes, ĝi estis treege (tre-eg-e) bela.
- Sed mi ne portis robon. Mi portis ruĝan T-ĉemizon kaj helbrunan jupon, kiel hodiaŭ.
- Aĥ ...

Peter ruĝiĝas. Por ŝanĝi la temon li demandas:

- Kiom da mono vi devis pagi por ĉio ĉi?
- Ĉio kostis dek kvin eŭrojn kaj dek cendojn. Peter, mi nun iros ankoraŭ en tiun librovendejon (libro-vend-ej-o-n).
- Kiun libron vi volas aĉeti?
- Mi volas aĉeti vortaron de Esperanto kaj sciencfikcian komikson.
- Mh, interese. Mi preferas amrakontojn (am-rakont-o-j-n).
- Nu, ĉiu havas alian guston.

2. Neue Wörter

aĉeti	(ein)kaufen	nu	nun, also
amo	Liebe	oni	man
botelo	Flasche	pano	Brot
bruna	braun	pardonis	verzeihen
cendo	Eurocent	peco	Stück
ĉio	alles	pomo	Apfel
ĉiu	jede/r/s	rakonto	Geschichte, Erzählung
da	von (nach Maßangaben, s. 3.4)	rekta	direkt, gerade

dek	zehn	rendevuo	Verabredung
dek kvin	fünfzehn	ruĝa	rot
du	zwei	ruĝiĝi	erröten, rot werden
eliri	hinausgehen	sako	Tasche (zum Tragen)
eŭro	Euro	sata	satt
fromaĝo	Käse	sciencfikcio	Science-Fiction
gusto	Geschmack	sekva	folgende/r/s
hela	hell	skatolo	Schachtel
hodiaŭ	heute	strato	Straße
inviti	einladen	ŝanĝi	ändern, wechseln
jupo	Rock	T-ĉemizo	T-Shirt (wörtl. Hemd)
kafo	Kaffee	temo	Thema
kilogramo	Kilogramm	teo	Tee
kiom	wieviel	tiel	so
komikso	Comic, Bildergeschichte	treege	sehr, äußerst
kosti	kosten	unu	eins
kuko	Kuchen	vere	wirklich
libro	Buch	vendejo	Geschäft
malsati	Hunger haben	vendi	verkaufen
manĝaĵo	Essen	vino	Wein
mateno	Morgen	voli	wollen
mono	Geld	vortaro	Wörterbuch
nigra	schwarz		

Wiederholung: *Eŭro* wird nicht wie „ojro“, sondern wie „eŭro“ ausgesprochen, also mit einem e-Laut am Anfang.

3. Grammatik

3.1 Zeit-, Längen- und Gewichtsangaben

Alle Zeit-, Längen- und Gewichtsangaben erhalten die Akkusativendung **-n**, z. B.:

la sekvan tagon – am nächsten Tag

Mi konas vin nur du tagojn. – Ich kenne dich erst zwei Tage.

Nur wenn sie selbst Subjekt des Satzes sind oder wenn sie durch eine Präposition (z. B. Deutsche Esperanto-Jugend – KEK Neuauflage Dez. 2022 – Lektion 3, Seite 2

en, dum, post, antaŭ) eingeleitet werden, stehen sie im Nominativ:

La dua tago estis bela. – Der zweite Tag war schön.

dum la sekva tago – am nächsten Tag (wörtlich: während des nächsten Tages)

3.2 Plural

Der Plural (Mehrzahl) wird durch die **Endung -j** gekennzeichnet.

Sie wird an die Endungen der Adjektive, Substantive bzw. vieler Pronomen gehängt und steht vor einer eventuellen Akkusativendung.

la ruĝaj T-ĉemizoj – die roten T-Shirts

tiuj ĉi pomoj – diese Äpfel

Ŝi aĉetis por mi du helajn ĉemizojn. – Sie kaufte für mich zwei helle Hemden.

Kiun vi vidas? Mi vidas ĉiujn. – Wen siehst du? Ich sehe alle.

3.3 Imperativ

Der Imperativ (Aufforderungsform) der Verben wird durch die **Endung -u** ausgedrückt:

iri – gehen → iru – geh, geht, gehen Sie

pardonu – verzeihen → pardonu – verzeih, verzeiht, verzeihen Sie

Die Endung *-u* kann auch an ein Verb mit Personalpronomen angehängt werden und drückt dann die **Absichtsform** (Volitiv) aus, die sich im Deutschen gut mit „lass uns“ oder „lass mich“ wiedergeben lässt:

Mi pripensu! – Lass mich nachdenken!

Ni iru! – Lass uns gehen!

3.4 Die Präposition *da*

Nach Adverbien, die gebraucht werden, um eine Menge eines unbestimmten Ganzen zu bezeichnen, wie auch nach Nomen mit einer solchen Bedeutung, wird im Esperanto in der Regel die nicht übersetzbare Präposition **da** gebraucht.

botelo **da** vino – eine Flasche Wein

kilogramo **da** pano kaj iom **da** butero – ein Kilo Brot und etwas Butter

Verben können ergänzt werden mit einem Adverb, z. B. *multe* – viel, und einem präpositionalen Ausdruck eingeleitet mit *da*:

Estas multe **da** sablo en la dezerto. - Es gibt viel Sand in der Wüste.

Li trinkis malmulte **da** akvo. – Er trank wenig Wasser.

Das betrifft auch das Fragewort *kiom* (= wie viel), falls das Bezugswort im Fragesatz genannt wird:

Kiom **da** mono? – Wie viel Geld?

Aber: Kiom mi devas pagi? – Wie viel muss ich bezahlen?

Aus den obigen Beispielen ist ersichtlich, dass bei einem Adverb gefolgt von *da* eher die Masse betont wird, die aus ähnlichen oder gleichen Dingen besteht. Ein Adjektiv mit einer Mengenangabe dagegen betont mehr die verschiedenartigen Dinge, aus denen diese Masse besteht.

3.5 Die Zahlen von 0 bis 9

0	1	2	3	4	5	6	7	8	9
nul	unu	du	tri	kvar	kvin	ses	sep	ok	naŭ

Zahlwörter werden nicht dekliniert. Sie erhalten kein Akkusativ-*n* und kein Plural-*j*.

3.6 Zusammengesetzte Wörter

Wie bereits angedeutet, können Wörter im Esperanto sehr einfach zusammengesetzt werden. Dabei steht, wie im Deutschen, das Bestimmungswort zuerst. Es wird meist ohne Endung vor das Grundwort gesetzt. Nur aufgrund von klanglicher Schönheit bzw. Übersichtlichkeit kann die Endung *-o* (selten *-a*) des Bestimmungswortes bestehen bleiben:

eliri (el-iri) – hinausgehen

amrakonto (am-rakonto) – Liebesgeschichte

duonfrato (duon-frato) – Halbbruder

teskatolo (auch: teo-skatolo) – Teeschachtel, Teebüchse

3.7 Wortbildungssilben

Präfix:

re-: wieder, noch einmal; zurück:

revidi – wiedersehen

Suffixe:

-aĵ- macht aus abstrakten Begriffen konkrete Sachen; Gegenstand:

vesti (jemanden anziehen) → vestaĵo – Kleidungsstück, Bekleidung

trinki → trinkaĵo – Getränk

blua (blau) → bluaĵo – etwas Blaues

-iĝ- zeigt einen Vorgang an: „zu etwas werden“:

ruĝa (rot) → ruĝiĝi – erröten

alta (hoch) → altiĝi – hoch werden, aufsteigen

-ist-: Berufsbezeichnung; Person, die eine Tätigkeit ständig ausführt:

vendi (verkaufen) → vendisto – Verkäufer

-et- schwächt ab, Verkleinerungsform; Gegenteil von *-eg-*:

libreto – Büchlein

beleĉa – hübsch, „ein bisschen schön“

4. Ĝbungen

4.1 Bilde den Plural:

1. robo
2. la blua ĵupo
3. Mi prenas tiun ĉi ruĝan pomon.

4.2 Ŭbersetze:

- | | |
|------------------------|----------------|
| 1. am gestrigen Tag | 9. Apfelkuchen |
| 2. herausgehen | 10. ĉiutago |
| 3. ich sehe dich | 11. tuttaga |
| 4. sieh! | 12. havaĵo |
| 5. Zahlen Sie! | 13. ree |
| 6. ein Kilogramm Kese | 14. aĵo |
| 7. seid! | 15. eta |
| 8. hellrot | |

5. „Vi kondutas kvazaŭ infano!“

Post unu horo, ambaŭ eliras el la librovendejo. Ili nun iras al kafejo. Antaŭ la kafejo, iu malalta, diketa viro demandas ilin:

- Pardonu, karaj, mi estas fremda en tiu ĉi urbo, kaj tiu ega trafiko ĉi tie en la centro tute ne plaĉas al mi. Mi serĉas la centran bibliotekon. Ĉu vi konas la vojon?

Peter jesas la demandon:

- Mi pripensu ... Iru unue en tiu ĉi direkto, ĝis la angulo. Prenu la straton dekstren kaj iru rekte ĝis alta arbo. Tie vi trovos haltejon de la tramo. Entramiĝu (en-tram-iĝ-u), veturu kvin staciojn, kaj eltramiĝu (el-tram-iĝ-u). Nun vi estos sur malgranda placo. Tie ekveturos aŭtobuso. Vi veturos sep staciojn kaj elbusiĝos (el-bus-iĝ-os). Dekstre de la aŭtobusa haltejo vi vidos grandan konstruaĵon. Tio estas la teatro. Apud la teatro vi trovos la urban muzeon. Malantaŭ la muzeo estas malgranda ponto. Transiru la ponton, maldekstre estos poŝtoficejo, sed vi iros dekstren ĝis aŭtovendejo. Tie bonvolu demandi denove (de-nov-e).

Klara ruĝiĝas:

- Sed mi proponas al vi iri en la alia direkto. Vi trovos la bibliotekon nur cent metrojn de ĉi tie, malantaŭ vi. Tio estas simpla kaj tre proksima.

Kaj al Peter mallaŭte:

- Ĉu vi ne kredas, ke vi kondutas kvazaŭ malbona infano?

La viro dankas ilin kaj foriras.

- Kaj nun ni iros en la kafejon (kaf-ej-o-n), Peter. Mi mendos tason da kafo kun sukero sen lakto. Kaj vi? Ĉu vi ankaŭ prenos kafon?
- Ne, mi preferas nigran teon kun lakto ... Cetere, hieraŭ mi prunteprenis lernolibron el la urba biblioteko kaj lernis unu frazon en Esperanto!
- Bonege! Kiun frazon?
- Ĝi konsistas el nur du vortoj: Saluton, salaton!

Klara ridas laŭte.

6. Neue Wörter

Folgende Wörter erklären sich wohl selbst: *centro*, *biblioteko*, *placo*, *(aŭto)buso*, *teatro*, *aŭto*, *metro*, *laŭte*, *vorto*.

ambaŭ	beide	mendi	bestellen
angulo	Ecke	metro	Meter
apud	neben, bei	muzeo	Museum
arbo	Baum	oficejo	Büro
aŭto	Auto	placo	Platz
aŭtobuso	Bus	ponto	Brücke
biblioteko	Bibliothek	poŝto	Post
cent	hundert	poŝtoficejo	Postfiliale
centro	Zentrum	ripensi	nachdenken, überlegen
dekstre	rechts	proksima	nah
dekstren	nach rechts	proponi	vorschlagen
denove	erneut, wieder	pruntepreni	sich (etw.) ausleihen
direkto	Richtung	ridi	lachen
frazo	Satz	salato	Salat
fremda	fremd	serĉi	suchen
haltejo	Haltestelle	simpla	einfach
halti	(an)halten	stacio	Station
infano	Kind	sukero	Zucker
jesi	Ja sagen	taso	Tasse
konduti	sich benehmen	teatro	Theater
konsisti (el)	bestehen aus	trafiko	Verkehr

konstruaĵo	Bauwerk, Gebäude	tramo	Straßenbahn
konstrui	bauen	trans	hinüber; auf der anderen Seite
kredi	glauben	trovi	finden
kvazaŭ	wie; so wie	unue	erstens; zuerst
lakto	Milch	urbo	Stadt
laŭte	laut	veturi	fahren
malantaŭ	hinter	vojo	Weg
maldekste	links	vorto	Wort

Lösungen zu 4.

4.1

1. roboj – die Kleider
2. la bluaj jupoj – die blauen Röcke
3. Mi prenas tiujn ĉi ruĝajn pomojn. – Ich nehme diese roten Äpfel.

4.2

- | | | |
|----------------------|-----------------------------|---------------|
| 1. la hieraŭan tagon | 6. unu kilogramo da fromaĝo | 11. ganztägig |
| 2. eliri | 7. Estu! | 12. Besitz |
| 3. Mi vidas vin. | 8. helruĝa | 13. erneut |
| 4. Vidu! | 9. pomkuko | 14. Ding |
| 5. Pagu! | 10. Alltag | 15. klein |

7. Kontrollübungen für deine Mentorin / deinen Mentor

7.1 Übersetze die folgenden Fragen ins Deutsche:

1. Ĉu la prezo de la kafo altiĝis?
2. Kiel mi trovos la urban muzeon?
3. Kiu estas tiu ĉi interesa viro?
4. Kiu el tiuj ĉi virinoj estas via edzino?
5. Kiu aŭto estas nia?
6. Kiun vi renkontis hieraŭ en la kafejo?
7. Kio estas en la skatolo?
8. Kion vi skribis al tiu knabo?
9. Kiom da sukero vi deziras?
10. Kiel vi nomiĝas?

7.2 Übersetze die folgenden Fragen ins Esperanto:

1. Wie geht es Ihnen?
2. Wer sind Sie?

3. Wen hast du gestern im Geschäft gesehen?
4. Was (Akkusativ) hast du gestern gekauft?
5. Hast du Äpfel gekauft?
6. Wie viele Äpfel hast du gekauft?

Zusatzaufgabe: Beantworte die Fragen auf Esperanto.

7.3 Übersetze folgende Wörter sinngemäß:

1. laktaĵo
2. enamiĝi (en-am-iĝ-i)
3. vorteto
4. elaŭtiĝi (el-aŭt-iĝ-i)
5. laŭtiĝi
6. mallaŭtiĝi
7. reheliĝi (re-hel-iĝ-i)
8. kontentiĝi